

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 93 - n. 2
MARZO - APRILE 2014

KARESMO 2014

**«Si è fatto povero
per arricchirci
con la sua povertà»**

(cfr.: 2Cor. 8,9)

Nel suo primo messaggio quaresimale Papa Francesco ci offre alcune riflessioni nel suo stile immediato e concreto. Prendendo spunto da un'espressione di San Paolo *«Conoscete la grazia del Signore nostro Gesù Cristo: da ricco che era, si è fatto povero per voi, perché voi diventaste ricchi per mezzo della sua povertà»*, egli ci invita a chiederci che cosa significhi per noi questo invito alla povertà. La sua risposta nei due punti qui riassunti.

La grazia di Cristo.

Dio si rivela non con i mezzi della potenza e della ricchezza, ma con quelli della debolezza e della povertà. La carità è condividere in tutto la sorte dell'amato. Così Gesù: ha lavorato con mani d'uomo, ha pensato con intelligenza d'uomo, ha agito con volontà d'uomo,

**«Li fariĝis malriĉa,
por ke ni riĉiĝu
per lia malriĉeco»**

(2Kor, 8,9)



En sia unua karesma mesaĝo Papo Francisko transdonas al ni kelkajn konsiderojn en sia stilo senpera kaj konkreta. Ĉerpante la inspiron de esprimo de Skta Paŭlo *«Vi scias la gracon de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke kvankam li estis riĉa, tamen pro vi li fariĝis malriĉa, por ke vi per lia malriĉeco fariĝu riĉaj»*, li starigas en ni la demandon pri kio signifas por ni ĉi tiu invito al la malriĉeco. Lia respondo en la du punktoj ĉi sube resumitaj.

La graco de Kristo.

Dio malkaŝas sin ne pere de la iloj de la forto kaj de la riĉeco, sed per tiuj de la malforteco kaj de la malriĉeco. Karitato estas partopreni plene la sorton de la amato. Tiel Jesuo: li laboris per homaj manoj, pensis per homa inteligento, agis laŭ homa volo, amis per

ha amato con cuore d'uomo. Nascendo da Maria, egli si è fatto uno di noi. La sua povertà è la più grande ricchezza: Gesù è ricco della sua fiducia in Dio Padre. È ricco come lo è un bambino che si sente amato e ama i suoi genitori e non dubita del loro amore.

La nostra testimonianza.

La ricchezza di Dio non può passare attraverso le nostre ricchezze, ma sempre e soltanto attraverso la nostra povertà. Noi cristiani siamo chiamati a guardare le miserie dei fratelli, a farcene carico per alleviarle.

La miseria è la povertà senza fiducia, senza solidarietà, senza speranza. Ci sono tre tipi di miseria: la miseria materiale, quella morale e quella spirituale.

La miseria materiale è comunemente chiamata povertà. Di fronte a questa miseria la Chiesa offre il suo servizio. Nei poveri e negli ultimi noi vediamo il volto di Cristo. Sia anche nostro impegno fare in modo che cessino nel mondo le violazioni della dignità umana, le discriminazioni e i soprusi.

La miseria morale consiste nella schiavitù del vizio e del peccato. Quante persone hanno smarrito il senso della vita, sono prive di prospettive e hanno perso la speranza!

La miseria spirituale è quella che ci colpisce quando ci allontaniamo da Dio e rifiutiamo il suo amore. Il Vangelo ne è l'antidoto: portiamo in ogni ambiente l'annuncio che Dio è più grande del nostro peccato e ci ama.

Infine in questa Quaresima domandiamoci di quali cose possiamo privarci per arricchire altri con la nostra povertà.

homa koro. Naskiĝante el Maria, li fariĝis unu el ni. Lia malriĉeco estas la plej granda riĉeco: Jesuo estas riĉa je lia fido en Dio Patro. Li estas riĉa tiel, kiel estas infano, kiu sin sentas amata de siaj gepatroj kaj ne dubas pri ilia amo.

Nia atesto.

La riĉeco de Dio ne povas alпасi per niaj riĉaĵoj, sed ĝi alpasas ĉiam kaj nur per nia malriĉeco. Ni kristanoj estas alvokataj alrigardi kaj surpreni la mizerojn de niaj fratoj por ilin mildigi.


La mizero estas la malriĉeco sen fido, sen solidareco, sen espero. Estas tri tipoj de mizero: la materia mizero, la morala mizero kaj la spirita mizero.

La materia mizero estas kutime nomata malriĉeco. Antaŭ ĉi tiu mizero la Eklezio disponigas sian servon. En la malriĉuloj kaj en la lastaj ni vidas la vizaĝon de Kristo. Estu ankaŭ nia sindevigo agi tiamaniere, ke ĉesu en la mondo la perfortoj de la homa digno, la diskriminacioj, la maljustaĵoj.

La morala mizero konsistas en la sklaveco de la malvirto kaj de la peko. Kiom da homoj perdis la sencon de la vivo, estas sen perspektivoj kaj perdis la esperon!

La spirita mizero estas tiu, kiu nin trafas kiam ni malapudiĝas de Dio kaj rifuzas lian amon. La Evangelio estas ĝia antidoto: ni alportu en ĉiun medion la anoncon, ke Dio estas pli granda ol nia peko kaj ke li amas nin.

Fine en ĉi tiu Karesmo, ni nin demandu de kiuj aferoj ni povas seniĝi por pliriĉigi la aliajn per nia malriĉeco.



INTERVJUO AL TEOLOGOJ EN TORINO

Intervale de prelego ĉe "Torino-cultura" profesiaj akademiaj teologoj de ĉiuj skoloj estis disponeblaj respondi al demandoj

(kolektis demandojn kaj respondojn Armando Zecchin)

1) Ĉu vi ne timas la ekvacion laŭ kio: "Dio ekzistas samcerte kiel la historieco de la rakonto pri la Noa Arkeo, kvazaŭ la Biblio estus kolekto de legendoj"?

R. Jes, tio povas okazi ĉe personoj malpli erudiciaj. Foje, nekonscie, enŝoviĝas tiu altrudiĝinta egaleco: dekomence iu povas rezisti, sed fine unu el la du kornoj venkas. Malbonŝance, ne ĉiam greftiĝas la principo, ke Dio revelaciigis parolante la homajn lingvaĵojn, do uzante ankaŭ legendojn.

2) Vi do, supozigas, ke la rakonto pri la Noa Arkeo estas legendo, ne historia evento. Kiamaniere vi savas la nerarecon de la Biblio, se ĝuste vi akceptas, ke tiu Noa Arkeo estas tuta kaj nura legendo?

R. La demando akriĝas se oni aldonas, ke multaj eventoj proklamitaj en la Biblio ricevas la saman juĝon pri sia reala okazintiĝo, kiel la "Babela Turo, la lukto inter Kaino kaj Abelo..."

3) Pasintaj teologoj, kaj ankaŭ Patroj de la Eklezio, sintezis tiel la aŭtoritatecon de la Bi-

blio anoncanta la principon: "la sankta verko estas tuta de Dio kaj tuta de la homa aŭtoro". Do, malfacilas certe purigi el la homaj alportaĵoj kaj reliefigi la Dian lingvaĵon.

struado en la eklezioj, bedaŭrinde, parolas kvazaŭ temus pri "historiaj eventoj"!


R. Tio veras; en la predikado de paŝtistoj kaj pastoroj, pri tiaĵoj daŭras silento, aŭ oni uzas es-

primojn, kiuj favoras al ambigueco kaj al la supra aludita ekvacio. Ekzemple, malmultaj aŭdacas diri, ke "nomo" en la Biblio signifas "personon", do en la Patronia la sintagmo "sanktigata estu via nomo" signifas "sanktigata estu via persono". Pri tio la Atestantoj de Jehovo lanĉas sian reton.

4) Kion pensi pri Jesuo kaj Sankta Petro, kiuj aludas senhezite pri la fakto de la konstruo de la Arkeo? Ĉu vere kredi, ke ilia tion uzis kiel nuran

ekzemplon, kies efikeco ĉe la amasoj dependis precipe el la kredita historia evento? Kien finiĝos ĉi-kaze, ilia senerareco? Ĉu Jesuo ŝajnis aŭ informite parolis?

R. Ja ne-erareco. En tiu kazo la biblia paĝo estas instruanta, ke Dio ĉeestas en la homa historio kaj ĝin juĝas laŭ sia



Gustave Doré: La Arkeo de Noa

Tamen la honesta scienco helpas, kaj la dono de la Sankta Spirito pluhelpas por ke tio ne fariĝu skandalo. Post la malkovro de la literaturaj ĝenroj, kaj de la diversa maniero "fari historion" de antikvuloj aparte orient-aziaj, la skandala forto malpliĝis ĉe kristanaj erudiciuloj, sed ne malofte la predikado kaj la in-

mistera vidpunkto: por pruvi tion, la sanktaj verkistoj utiligas legendojn. Ĉu vi konas la fabelon “Pinokjo”, kiu ju pli mensogas des pli plilongiĝas lia nazo? La fabelo celas malŝatigi la mensogon, ne instrui, ke la nazo plilongiĝas. Pri la fakto ĉu Jesuo kredis aŭ fikcie uzis la komparon de la kredita historia evento, estas teologia nocio sufiĉe komplika. Oni sciu, ke la *homa* inteligento de Kristo ne ĉion sciis, kaj ke eĉ ĝi ĝuis la limojn de la kreskiĝo (kp. Luko 2, 52).

5) *Ĉu vi opinias ke vere kelkaj sukcesis vidi la konturon de iu arkeo sur glacio de montoj Ararat? Se vere sur tiuj montoj postdeluve apogiĝis la Arkeo, ĉu eblas ĝin vidi nudokule aŭ per sciencaj iloj nun?*

R. Se sur glacio ĝi kuŝiĝis, ĝi sekvis la movojn de la glacio al la malalto, kaj frue aŭ malfrue ĝi atingis aŭ atingos la plej malaltan glacian punkton, kiu estas videbla nudokule. Ĉu vi memoras la mumio de Similaun? La montaj glacioj moviĝas konstante laŭ precizaj leĝoj. Ĉu eblas, ke iu el ili ankoraŭ gastigas la arkeon? Se vere ĝi ĝin ankoraŭ entenas en sia sino, ĝin oni ne povas vidi per simpla rigardo kaj ne estas konata sistemo por penetri kaj esplori el la supro. Kaj se ĝi jam atingis la malsupron, certe jam dissolviĝis aŭ la akvoj ĝin putrigis...

6) *Ĉu povas ĉeesti mitologio en la Biblio? Nome, eroj de mitoj, kopiitaj kaj adaptitaj al monoteismo, de aliaj religioj aŭ kulturoj?*

R. La koncepto pri mitologio varias: kaj ĉiu tipo de mitologio enmerĝiĝas en specifajn problemojn. Tamen, ankaŭ la aŭtoroj de la Biblio uzis la homajn lingvaĵojn, inter kiuj estas tiu per kiu oni komprenigas, ke Dio aŭ liaj verkoj povas esti priskribitaj ankaŭ per mitologiaj bildoj.

7) *Ĉu vi ne opinias, ke la Biblio foje sin servis je mitologiaĵoj ĉeestantaj jam en aliaj kulturoj kaj religioj?*

R. Jes, sed rigide transformitaj al subteno de la rigida monoteismo. Vidu en Ijob 1, 6-12, kie estas rakontate pri kunveno de kortegaj elstaruloj kunvokitaj de Dio. Se oni pensas ke, jam antaŭe en la mezopotamia mitologio, oni parolis pri asembleoj de la dioj kaj duondioj, aŭ pri konsultiĝo, sur la monto Olimpo, inter la dioj kaj diaĵoj tuj antaŭ la milito do Trojo laŭ la Iliado de Homero, kaj ke, laŭ la sumera mitologio, la supera dio Anu kunvokas al koncilio ĉiujn diecajn malsuperulojn por decidi kaj dekreti, facile oni konkludas ke ĉi-foje la Biblio ne malŝatis utiligi tian mitologiaĵojn... Fakte, la Biblio ŝajnas imiti mitologiaĵojn, ekzemple, en la komenco de la libro de Ijob, kiam Dio kunvokus la membrojn de sia kortego por informi kaj ricevi opiniojn pri la konduto de la laŭdinda fidelulo Ijob (en tiu kunveno partoprenas ankaŭ Satano). Kaj plue la enscenigo de du arboj donantaj ion superan al la manĝantoj, la “arbo de la vivo” kaj la “arbo

de bono kaj malbono” en la ĝardeno de Genezo 3, kiuj trovas sian similaĵojn en diversaj orientaj mitologioj...

8) *Ĉu vi opinias, ke la konscio pri la ĉeesto de mitologiaĵoj en la Biblio malintensigas la fidon de fideluloj?*

R. Laŭ ni ne, se oni eksplikas, ke Dio uzadis tiun lingvaĵon, kiu estis la lingvaĵo de la tiama kulturoj. Eĉ tiu informo, eventuale pruvita per ekzemploj, malebligas eblajn, kontraŭbibliajn objetojn. Oni vidu, ke ĉiuj tiaj lingvaĵoj estas submetitaj kaj penetritaj de rigida monoteismo. Cetere ankaŭ la plantoj kaj la akvo kaj la maro estas en la Nova Testamento personigitaj por igi ilin obeaj al la volo de Kristo. (Vidu: Marko 4, 39; 11, 12-14; 11, 20-21; Mateo 21, 18-19).

9) *Revenante al la Noa Arkeo: ĉu la rakonto mem inokulas, ke temas pri legendoj utiligitaj por instrui moralajn kaj teologiajn verojn?*

R. Jes: la rakonto mem tion sugestas ĉar, foje, la datenoj estas malsamaj kaj kontraŭdiraj. Ekzemple, la surakva flosado 40-taga (laŭ javisto) aŭ unu jaro (laŭ sacerdota redakto). La rakonto, plue, ne imagis la stivadon de nutraĵoj por bestoj kiel por la taŭroj aŭ por elefantoj aŭ kameloj... Ĉiukaze, tiu stivado jam el si mem ne trovas lokon en la arkeo...

(*Sonorileto anoncas, ke rekomenciĝas la laboroj de la kunvenantoj*).



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

OBEDIENZA PURA

Come sono belli i bambini quando fanno molte domande! Riescono sempre a sorprenderci. Anche gli adulti, quando desiderano impegnarsi nella vita, pongono svariate domande a maestri e a professori. Però c'è modo e modo di fare domande. Il modo più frequente è quello di raccogliere idee o pareri su questioni più o meno importanti. Tuttavia, quando si fanno domande serie e impegnative, si rischia sempre di porle in modo sbagliato.

Nel Vangelo si narra di un giovane ricco che interroga Gesù riguardo alla propria salvezza: «*Maestro buono, che cosa devo fare per avere in eredità la vita eterna?*» (Mc 10, 17). Nel porre questa domanda, la più seria in assoluto, il giovane desidera conoscere il parere di un maestro straordinario, qual era Gesù di Nazareth, pur avendo già letto la Bibbia. Con la sua risposta Gesù smaschera il tentativo di giocare sulle cose serie, ricordando che la bontà la si trova solo in Dio. Tuttavia, quale «*Maestro buono*» in quanto Figlio di Dio, invita semplicemente il giovane a osservare i comandamenti. Infatti la conoscenza non basta: ci vuole l'obbedienza pura e semplice.

Nel Vangelo di Matteo il giovane cerca di sfuggire a questa obbedienza, ponendo una seconda domanda: «*Quali?*» (Mt 19, 18). Si sa che gli ebrei hanno tanti comandi e divieti, rivolti a tutte le categorie di persone e a seconda dei momenti e delle situazioni. Perciò il giovane chie-

PURA OBEO

Kiel belaj estas la infanoj, kiam ili faras multajn demandojn! Ili ĉiam kapablas surprizi nin. Ankaŭ la plenkreskuloj, kiam ili deziras engaĝiĝi en la vivo, sin turnas per diversaj demandoj al majstroj kaj al profesoroj. Sed ekzistas malsamaj manieroj starigi demandojn. La plej ofta estas kolekti ideojn aŭ opiniojn pri pli aŭ malpli gravaj problemoj. Tamen, kiam oni faras demandojn seriozajn kaj sindevigajn, oni ĉiam riskas starigi ilin malĝuste.

En la Evangelio oni rakontas pri riĉa junulo, kiu demandas Jesuon pri sia propra savo: «*Bona Majstro, kion mi devas fari, por ke mi heredu la eternan vivon?*» (Mk 10, 17). Formulante tiun ĉi demandon, nepre la plej gravan, la junulo deziras koni la opinion de eksterordinara majstro, kia estas Jesuo de Nazareto, kvankam li jam legis la Biblion. Per sia respondo Jesuo senmaskigas lian klopodon ludi kun la seriozaj aferoj, memorigante, ke la boneco troviĝas nur en Dio. Tamen, kiel «*bona Majstro*», estante Filo de Dio, li simple invitas la junulon observi la diajn ordonojn. Fakte, ne sufiĉas la konon: necesas la pura kaj simpla obeo.

En la Evangelio de Mateo la junulo klopodas eviti tiun ĉi obeon, formulante duan demandon: «*Kiujn?*» (Mt 19, 18). Oni scias ke la hebreaĵoj havas multajn ordonojn kaj malpermesojn, preskribitajn por ĉiuj rangoj de personoj kaj laŭ la momentoj kaj laŭ la situacioj. Pro tio la

de al maestro quali comandamenti spettano direttamente a lui. Con semplicità Gesù ne enumera alcuni, invitando il giovane a non ragionare come uno che dall'alto valuta il pro e il contro, e gli chiede di ascoltare con semplicità il comandamento, obbedendo tranquillamente come un bambino.

Ma il giovane del Vangelo ha in serbo un'ultima domanda: *«Tutte queste cose le ho osservate; che altro mi manca?»* (Mt 19, 20). Ecco un ulteriore tentativo di fuga: sta chiedendo qualcosa di straordinario, che non sia contenuto nel comandamento, ma che riguarda la sua persona. Un ulteriore sforzo per conquistare la salvezza presso Dio.

Allora Gesù gli dice: *«Se vuoi essere perfetto, va', vendi quello che possiedi, dallo ai poveri e avrai un tesoro nei cieli; e vieni! Seguimi!»* (Mt 19, 21). La salvezza non la si conquista: la si ottiene come un dono. La vita eterna non sarà un prolungamento di questa nostra vita terrena: sarà un totalmente altro, come lo è la pianta cresciuta rispetto al seme. Per questo Gesù chiede al giovane di tagliare decisamente con il proprio passato, dando tutto a chi non può minimamente restituire, e di seguire lui, di cui nessuno sa dove vada, imitandone la vita.

Il Vangelo riferisce poi che quel *«giovane, udita questa parola, se ne andò, triste; possedeva infatti molte ricchezze»* (Mt 19, 22). Una conclusione che fa pensare: le nostre conquiste possono impedirci di ottenere l'unica cosa veramente importante. Si potrebbe aggiungere che gli scarsi risultati della lingua internazionale tengono aperto il discorso sul suo futuro, anche se non è possibile saperne la meta finale. Quello che conta davvero è l'invito: *«tu vieni e seguimi!»* (Mt 19, 21).

junulo demandas la majstron pri la ordonoj, kiuj koncernas lin direkte. Jesuo simple elnombras kelkajn el ili, invitante la junulon ne rezoni kiel tiu, kiu desupre pesas la “por” kaj la “kontraŭ”, kaj li petas lin, ke li simplanime aŭskultu la ordonon, ĝin obeante trankvile kiel infano.

Sed la junulo de la Evangelio havas alian demandon, la lastan: *«Ĉion tion mi observis; kio ankoraŭ mankas al mi?»* (Mt 19, 20). Jen plua klopodo por eskapi: li estas petanta ion eksterordinaran, kio ne estu entenata en la dia ordono, sed koncernanta lian propran personon. Tio estas, alia strebo por konkeri la savon ĉe Dio.

Tiam Jesuo diras al li: *«Se vi deziras esti perfekta, iru, vendu viajn posedaĵojn, donu ilin al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo; kaj venu! Sekvu min!»* (Mt 19, 21). Oni ne povas konkeri la savon: ni povas atingi ĝin kiel donon. La eterna vivo ne estos la daŭrigo de tiu ĉi nia surtera vivo: ĝi estos tute alio, kiel la kreskinta arbo kompare kun la semo. Pro tio Jesuo petas de la junulo, ke li senhezite tranĉu sian propran pasintecon, donante ĉion al tiu, kiu absolute ne povos redoni ion ajn, kaj sekvu lin, pri kiu neniu scias, kien li iras, imitante lian vivon.

La Evangelio poste eksplikas, ke tiu *«junulo, aŭdinte tiun ĉi diron, foriris malĝoja, ĉar li havis multajn posedaĵojn»* (Mt 19, 22). Konkludo kiu pripensigas: niaj konkeroj kapablas malebligi nin atingi la unikan aferon vere gravan. Aldone ni povas diri ke la etaj rezultoj de la internacia lingvo tenas malfermita la temon pri ĝia estonto, eĉ se ne estas eble ekscii pri ĝia fina konkludo. Tio, kio vere gravas, estas ĉiam la invito: *«venu kaj sekvu min!»* (Mt 19, 21).

Dirite inter ni ...



033

EN LA KLASO

- Saluton, karegaj.
- Bonan vesperon.
- Ĉu vi scias, kion antaŭvidas nia hodiaŭa leciono?
- Kiel kutime, vi donis al ni la programon.
- Jes, ĉar ĝi devas esti gvidilo por ni.
- Tamen ĝi estas tro plena.
- Mi konsentas, sed vi volas prepari vin por la ekzameno, kiuj okazos en Junio.
- Jes, ni celas al tio.
- Ĉu ni komencu?
- De kio?
- Ni legu la programon.
- Je la unua punkto, ni havas diktaĵon.
- Kaj ni komencu farante la diktaĵon.
- Pri kio temas?
- Temas pri peco eltirita el la libro "Koloroj".
- Kiu skribis ĝin?
- Ĝin skribis nia granda poeto.
- Se temas pri Esperanta poeto, ni estas certaj, ke nia instruisto elektis la poeton, kiun li amas plej multe.
- Kaj kiu estus tiu poeto?
- Estas facile.
- Diru.
- Temas pri Julio Baghy.
- Ha, vi plene trafis.
- Estis facile, kiel ni diris.
- Mi agnoskas mian simpaton al Julio Baghy.
- Kaj kial vi ŝatas lin tiel multe?

IN CLASSE

- Salve, carissimi.
- Buona sera.
- Sapete che cosa prevede la nostra lezione odierna?
- Come al solito, ci ha dato il programma.
- Sì, perché deve essere una guida per noi.
- Ma è troppo pieno.
- Sono d'accordo, ma voi volete prepararvi per gli esami che avranno luogo in giugno.
- Sì, miriamo a questo.
- Cominciamo?
- Con che cosa?
- Leggiamo il programma.
- Al primo punto abbiamo un dettato.
- E cominciamo facendo il dettato.
- Di che si tratta?
- Si tratta di un pezzo tratto dal libro "Colori".
- Chi l'ha scritto?
- L'ha scritto un nostro grande poeta.
- Se si tratta di un poeta esperantista, siamo sicuri che il nostro insegnante ha scelto il poeta che egli ama di più.
- E chi sarebbe quel poeta?
- È facile.
- Dite.
- Si tratta di Giulio Baghy.
- Ah, avete colto pienamente nel segno.
- È stato facile, come abbiamo detto.
- Riconosco la mia simpatia per Giulio Baghy.
- E perché lo apprezza così tanto?



- Ĉar li estas vera poeto.
- Laŭ kiu vidpunkto?
- Laŭ pluraj vidpunktoj.
- Ekzemple?
- Li estas poeto ankaŭ kiam li skribas prozon.
- Tio estas vera.
- Kial vi diras tion?
- Ĉar ni legis unu lian libron.
- Kiun libron vi legis?
- Ni legis la libron "Koloroj".
- Ha!
- Kial vi miras?
- Ĉar mi preparis la pecon por la diktaĵo ĝuste el "Koloroj".
- Estas bone por ni.
- Ne, ne estas bone por vi, ĉar nun ne temas pri ekzameno, sed pri ekzerco.
- Sed vi ne havas alian pecon.
- Kiu diras tion?
- Ni opinias, ke vi ne kunportis duan pecon.
- Hu, en mia sako estas multe da materialo.
- Ni scias, ke via sako estas neelĉerpebla puto.
- Sed ĉu vi opinias, ke mi ne kapablas fari al vi diktaĵon, se mi ne havus mian sakon?
- Vi povus inventi ion, sed vi ne povus kondukti kiel dum la ekzameno.
- Nome?
- Tio estas, ke vi ne povus legi, dikti kaj relegi.
- Sed vi ne konas tro bone vian instruiston.
- Ĉu vere?
- Mi konas parkere alian pecon.
- El alia libro.
- Sed, kompreneble, el libro de Julio Baghy!
- Perché è un vero poeta.
- In che senso?
- In più sensi.
- Ad esempio?
- È un poeta anche quando scrive della prosa.
- Questo è vero.
- Perché dite questo?
- Perché abbiamo letto un suo libro.
- Che libro avete letto?
- Abbiamo letto il libro "Colori".
- Ah!
- Perché si meraviglia?
- Perché ho preparato il pezzo per il dettato proprio da "Colori".
- Va bene per noi.
- No, non va bene per voi, perché ora non si tratta di un esame, ma di un esercizio.
- Ma non ha un altro pezzo.
- Chi lo dice?
- Crediamo che non abbia portato un secondo pezzo.
- Uh, nella mia borsa c'è molto materiale.
- Sappiamo che la sua borsa è un pozzo inesauribile.
- Ma credete che non sarei capace di farvi un dettato, se non avessi la mia borsa?
- Potrebbe inventare qualcosa, ma non potrebbe comportarsi come durante l'esame.
- Cioè?
- Cioè, che non potrebbe leggere, dettare e rileggere.
- Ma non conoscete troppo bene il vostro insegnante.
- Davvero?
- Conosco a memoria un altro pezzo.
- Da un altro libro.
- Ma, naturalmente, da un libro di Giulio Baghy!

034

ĈE JOHANO

- Saluton, Johano.
- Saluton, Glaŭko.
- Fine mi alvenis.
- Ĉu vi havis malfacilaĵojn por trovi la vojon?
- Ne estis tro facile, sed mi sukcesis.
- Kie vi perdiĝis?
- Nu, mi perdiĝis, kiam mi alvenis en Kormano.
- Ĉu vi ne indikigis al vi la vojon de iu?
- Jes, kaj tio estis la eraro.
- Kial?
- Ĉar antaŭe mi havis klarajn ideojn, sed poste...

DA GIOVANNI

- Ciao, Giovanni.
- Ciao, Glauco.
- Finalmente sono arrivato.
- Hai avuto difficoltà a trovare la strada?
- Non è stato troppo facile, ma ci sono riuscito.
- Dove ti sei perduto?
- Beh, mi sono perduto quando sono arrivato a Cormano.
- Non ti sei fatto indicare la strada da qualcuno?
- Sì, e quello è stato lo sbaglio.
- Perché?
- Perché prima avevo le idee chiare, ma dopo...



- Sed poste?
- Oni komencis diri: iru rekten ĝis vi trovos semaforon, poste turnu dekstren, turnu de-nove, sed maldekstren, poste reiru dekstren ktp.
- Ĉu ne estis klare?
- Ĝis tiam estis klare, sed apudiĝis alia persono, kiu diris, ke estus pli bone se... kaj mi komprenis plu nenion.
- Jen, vi tamen estas tie ĉi.
- Jes, mi estas tie ĉi.
- La venontan fojon estos pli facile.
- Certe. Sed kio estas tio?
- Nu, estas fonto kun akvaj plantoj kaj fiŝoj.
- Ma dopo?
- Han incominciato a dirmi: vada diritto finché troverà un semaforo, poi giri a destra, giri di nuovo, ma a sinistra, poi vada ancora a destra, eccetera.
- Non era chiaro?
- Fino ad allora era stato chiaro, ma si è avvicinata un'altra persona che ha detto, che sarebbe stato meglio se... ed io non ho più capito niente.
- Ecco, tuttavia sei qui.
- Sì, sono qui.
- La prossima volta sarà più facile.
- Certamente. Ma che cosa è quella?
- Beh, è una fonte con piante acquatiche e pesci.

- Sed la plantoj havas ankaŭ belajn florojn.
- Jes, tiuj floroj estas belegaj.
- Mi tion vidas. Kaj, kio estas tio?
- Ha, tio estas ŝildo, kun surskribita la dato de mia alveno ĉi tien.
- Interese.
- Iom da historio. Ĉu ni plu-iru?
- Jes, mi sekvas vin.
- Ĉi tie estas la plantoj de mia edzino.
- Ĉu tiom multaj?
- Jes, kaj ili estas apud la muro.
- Kiu donas akvon al ili?
- Kiam la Ĉiela Patro ne zorgas mem, tiam estas Marjolina, kiu ĝin donas al ili.
- Kaj se Marjolina ne ĉeestas?
- Tiam, tio fariĝas mia tasko, kaj mi certigas vin, ke temas pri vere laciga laboro.
- Ĉu estas multaj la plantoj?
- Pli multe ol 250.
- Al mi ili ne ŝajnas tiom multaj.
- Ĉar vi ne enkalkulas tiujn, kiuj estas hejme.
- Sed mi sciis, ke estas vi tiu, kiu kolektas plantojn.
- Jes, vi pravas, sed miaj plantoj estas plantoj grasaj.
- Kaj ili estas preskaŭ 500.
- Ili tamen ne bezonas tiom da akvo.
- Ĉu vere?
- Jes, mi banas ilin ĉiun duan semajnon.
- Kaj kiom da foje oni devas bani la plantojn de Marjolina?
- Ĉiun tagon.
- Akcidente!
- Kaj se mi ne banas ilin, Marjolina protestas.
- Sed, feliĉe, ŝi estas preskaŭ ĉiam hejme.
- Kaj mi profitas...
- Jes, ĉar ŝi banas ankaŭ viajn plantojn.
- Ma le piante hanno anche dei bei fiori.
- Sì, quei fiori sono bellissimi.
- Lo vedo. E che cosa è quello?
- Ah, quella è una targa, con sopra scritta la data del mio arrivo in questo luogo.
- Interessante.
- Un po' di storia. Proseguiamo?
- Sì, ti seguo.
- Qui ci sono le piante di mia moglie.
- Così tante?
- Sì, e sono vicine al muro.
- Chi dà loro l'acqua?
- Quando non ci pensa il Padre Celeste, allora è Mariolina che gliene dà.
- E se non c'è Mariolina?
- Allora diventa compito mio e ti assicuro, che si tratta di un lavoro che stanca veramente.
- Sono molte le piante?
- Più di 250.
- Non mi sembrano tante.
- Perché non calcoli quelle che sono in casa.
- Ma sapevo che eri tu quello che collezionava piante.
- Sì, hai ragione, ma le mie sono piante grasse.
- E sono quasi cinquecento.
- Però non hanno bisogno di tanta acqua.
- Davvero?
- Sì, le bagno ogni seconda settimana.
- E quante volte si devono bagnare le piante di Mariolina?
- Ogni giorno.
- Accidenti!
- E se non le bagno, Mariolina protesta.
- Ma felicemente lei è quasi sempre a casa.
- E io approfitto...
- Sì, perché lei bagna anche le tue piante.



Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

QUESITI

DEMANDOJ

*Non domandarti,
non lo saprai mai,
perché,
quando respira l'alba,
par trasalire l'albero
che abbraccia con i rami
la tua casa.*

*Non domandarti
cosa dice al cielo
il pigolio insistente,
quasi struggente,
del passero sul ramo;
ed il frinire arroventato
della cicala occulta,
nel meriggio assolato.*

*Leggere vorresti
nei geroglifici
che la rondine scrive
volando
dal tetto all'onda.*

*Oh, fermare del pensiero
i quesiti.
Cancellare
ombre e parvenze
credute...
Sgombrare
d'ogni memoria
l'anima,
attingere, sbiancata,
all'eterno!*



*Ne demandu vin,
tion vi neniam scios,
kial,
kiam spiras la tagiĝo,
ŝajnas ekstremitoj l' arbo
brakumanta per branĉoj
vian domon.*

*Ne demandu vin
kion diras al la ĉielo
la daŭra pepado,
preskaŭ korprema,
de l' pasero surbranĉe;
kaj la flamiĝinta ĉirpado
de kaŝita cikado
en sunoplena tagmezo.*

*Vi volus privileĝi
en la hieroglifoj
kiujn la hirundo skribas
flugante
de l' tegmento al la ondo.*

*Ho, haltigi de la penso
la demandojn.
Forviŝi
ombrojn kaj ŝajnojn
supozitajn...
Liberigi
de ĉiu memoro
la animon,
ĉerpi, blankiĝinta,
el la eterno!*

Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Covelli)

UNIONE ESPERANTISTA CATTOLICA ITALIANA

Relazione morale per l'anno 2013

Nel 2013, erano iscritti all'UECI 114 associati: 3 SVE, 1 SV, 2 SSE, 1SS/AE, 1 SS, 31 SOE, 55 SO, 2 SG, 18 SF. Rispetto al 2012 ci sono 8 associati in meno (tuttavia ci sono 6 nuovi iscritti). Tra gli associati ci sono 6 sacerdoti. I sei numeri di Katolika Sento sono stati spediti a 205 indirizzi, con alcuni invii multipli, per un totale 240 copie a bimestre. Gli abbonati a K.S. erano 120 (di cui 96 associati), inoltre sono stati spediti per propaganda: una copia ad ognuno dei 37 gruppi esperantisti italiani, qualche copia agli insegnanti che ne hanno fatto richiesta, alcune a qualche biblioteca, enti pubblici e a diverse personalità. La tiratura di K.S. è stata di 300 copie al bimestre, quindi superiore al numero di abbonati. È stata inviata una copia anche a 10 che, abbonati nel 2012, non hanno rinnovato l'abbonamento nel 2013 in attesa di qualche ritardatario. Sono stati raccolti inoltre 43 abbonamenti a E.K. e 4 a Dia Regno.

Il nostro sito (www.ueci.it) è stato costantemente aggiornato e arricchito, così come su *Ipernity* è costantemente aggiornata la pagina "Katolika Sento":

www.ipernity.com/home/177224

gestita da Tiziana Fossati.

Come meglio quantificato nella relazione finanziaria, l'UECI ha inviato aiuti in denaro in aiuto agli orfani del centro "Solidareco Bona Volo" di Goma (R.D.del Congo) per un totale di 3475 euro offerti da Lucia Miano.

L'assemblea generale degli associati si è tenuta domenica 26 maggio 2013 nell'ambito del 27° congresso UECI svoltosi presso il Collegio Celana di Caprino Bergamasco. Il congresso ha visto la presenza di 34 partecipanti su 41 iscritti (all'inaugurazione erano presenti anche 10 ospiti). I due temi del congresso erano: quello religioso: "Anno della Fede" e quello culturale: "L'Editto di Milano" sono intervenuti: Giovanni Daminelli Ida Bossi Norma Cescotti, Tiziana Fossati e, con una nota scritta,

Carlo Sarandrea. Meta delle due escursioni pomeridiane furono i luoghi cari a Papa Giovanni XXIII, cioè, domenica a Bergamo Alta e lunedì a Sotto il Monte, Santuario della Madonna del Bosco e Abbazia di Pontida.

Sei gli italiani che hanno partecipato al 66° Congresso I.K.U.E. di Kalwaria Zebrzydowska (Polonia) dal 13 al 20 luglio. Alcuni dei nostri hanno partecipato all'80° congresso FEI di Castellaro. In tale occasione don Luigi Alfano ha celebrato una S. Messa in Esperanto nella Chiesa parrocchiale.

Gruppi locali.

Purtroppo il progressivo calo del numero di iscritti ha portato alla sopravvivenza di soli tre gruppi locali (con almeno 10 membri): Milano, Vercelli e Treviso.

Il gruppo di Milano continua ad organizzare la celebrazione della S. Messa mensile in Esperanto ed il consueto appuntamento a Roma in piazza S. Pietro per la benedizione *urbi et orbi* a Pasqua e a Natale; tre dei suoi associati sono consiglieri attivi del Circolo Esperantista Milanese impegnati nell'insegnamento, propaganda e diffusione degli ideali esperantisti.

Il gruppo di Treviso, in particolare tramite il dr. Boschin, tiene contatti con esperantisti di altri paesi, ha donato un abbonamento a K.S. per la biblioteca del Seminario Vescovile e svolge attività didattica e di propaganda.

Il gruppo di Vercelli è attivo nel Gruppo Esperantista vercellese, per le attività culturali e per la distribuzione di Katolika Sento.

Ricordiamo anche il Cer-es di Rimini, che pur non totalizzando i 10 ueci-anoj, è pur sempre attivo nel portare avanti le iniziative di don Duilio particolarmente in Benin e in Congo.

Per finire un ricordo e una preghiera di suffragio per i nostri associati deceduti nel 2013: Gastone Boragini e Lucia Miano.

Il Comitato Centrale UECI

UNIONE ESPERANTISTA CATTOLICA ITALIANA

Relazione finanziaria per l'anno 2013

Nella tabella allegata sono riassunte le entrate e le uscite suddivise secondo i capitoli di rispettiva imputazione.

Al 1° gennaio 2013, il patrimonio complessivo dell'Unione ammontava a €14788,83; alla data del 31 dicembre lo stesso ammontava a €15343,09 (incremento di € 554,26). Le somme sono così allocate:

- € 4097,91 sul CCP,
- € 5705,04 su libretto postale,
- € 5768,31 in buoni fruttiferi postali,
- € -268,17 in contanti presso il presidente.

La ripartizione del patrimonio è suddivisa, secondo le decisioni deliberate nel corso degli anni, in cinque fondi, e precisamente: fondo per la gestione amministrativa e l'attività statutaria dell'UECI; fondo pro-alfabetizzazione; fondo per le attività di beneficenza, fondo per sovvenzioni premio da assegnare secondo le modalità e gli scopi resi noti dalla rivista associativa, e, infine, fondo che raccoglie le quote associative versate a suo tempo dagli associati vitalizi.

Entrate:

Le quote associative (€ 1138,05) sono pervenute da un totale di 114 associati. Gli abbonamenti a Katolika Sento di 96 associati e 24 simpatizzanti non associati hanno totalizzato € 1281,00. Le offerte liberali a favore di UECI ammontano a € 74,10.

Gli interessi netti ammontano a € 157,86 dei quali 1,07 maturati sul c/c Postale, 40,00 su libretto postale e 143,43 su buoni fruttiferi postali.

Il congresso UECI del 2013 ha avuto entrate per € 6642,00 compresi i contributi volontari.

Le offerte liberali per le attività di beneficenza ammontano in totale a € 3359,00. Que-

ste offerte comprendono una unica elargizione di 2500 € a condizione di spedirne 2000 per gli orfani di Goma (Rep. Democratica del Congo). Come stabilito in assemblea, parte di queste offerte (€ 751) sono andate ad azzerare il fondo alfabetizzazione che era negativo.

La voce ricavo Pubblicazioni comprende la vendita di qualche libro durante i congressi UECI e IKUE.

Uscite:

I gruppi locali con almeno 10 membri hanno diritto a trattenere € 2,10 per ogni membro ordinario e € 1,05 per ogni membro familiare o giovane. Ne hanno usufruito i gruppi di Vercelli, Milano e Treviso per un totale di € 54,60.

Le spese per la realizzazione e invio della rivista Katolika Sento continuano a rappresentare la maggiore voce di uscita (€ 2513,10).

Le spese per cancelleria e postali (€ 133,97) comprendono le lettere di convocazione dell'assemblea, ma non la spedizione di K.S.

Le uscite per la gestione e movimentazione del conto corrente postale (€193,25) hanno superato gli interessi maturati (€ 144,50).

Il congresso UECI ha comportato uscite di € 5099,42 (quindi un attivo di € 1542,58) che rappresenta un risultato al di sopra di quanto in origine preventivato (€ 500).

L'uscita per beneficenza di € 4226,60 comprende € 751,00 per l'azzeramento del fondo alfabetizzazione e € 3475,60 inviati agli orfani di Goma e devoluti da L. Miano nel 2013.

La voce pubblicazioni (€ 110) riguarda l'acquisto di 7 Bibbie scontate di 1/3 e poste in vendita a prezzo pieno.

Il Comitato Centrale UECI

UNIONE ESPERANTISTA CATTOLICA ITALIANA

Rendiconto gestione 1/1/2013 - 31/12/2013

ENTRATE EFFETTIVE

Quote associative	1138,05		
Abbonamenti a Katolika Sento	1281,00		
Offerte a favore UECI	74,10		
Interessi Titoli e Depositi	184,50		
Quote Congresso UECI	6425,00		
Contributi Congresso UECI	217,00		
Ricavo Pubblicazioni	205,00		
Pro-Alfabetizzazione	751,00		
Beneficenza	2608,00		
Propaganda	0,00		
TOTALE	€	12883,65	

USCITE EFFETTIVE

Quote ai Gruppi Locali	-54,60		
Stampa e spedizione Katolika Sento	-2513,10		
Cancelleria, spese postali, bollettini C/C.	-133,97		
Gestione conti bancari	-193,25		
Congresso UECI	-5099,42		
Alfabetizzazione	0,00		
Beneficenza	-4226,60		
Sito Internet/Propaganda	0,00		
Pubblicazioni	-110,00		
TOTALE	€	-12330,94	

ENTRATE PER PARTITE DI GIRO

Quote per IKUE	162,85		
Abbonamenti a Espero Katolika	954,00		
Abbonamenti a Dia Regno	46,00		
TOTALE	€	1162,85	

USCITE PER PARTITE DI GIRO

Quote per IKUE	-161,30		
Abbonamenti a Espero Katolika	-954,00		
Abbonamenti a Dia Regno	-46,00		
TOTALE	€	-1161,30	
SALDO FINALE	€	554,26	

SITUAZIONE PATRIMONIALE:

Al 31/12/2013 sono in cassa **€ 15343,09** così allocati:

€ 4097,91 su c/c; € 5745,04 su libretto postale; € 5768,31 in buoni postali; € -268,17 contante e così suddivisi nei vari fondi:

€ 11499,18 UECI; € 0,00 Alfabetizzazione; € 485,40 Beneficenza; € 774,68 Premi;
€ 2582,28 Soci Vitalizi; € 1,55 Partite di giro.



Da più di tre anni, ogni mercoledì il Circolo Esperantista Milanese è aperto a tutti dalle 17:00 alle 19:00 per incontri di conversazione in esperanto. Dalla foto si può notare che almeno la metà dei partecipanti abituali è formata da associati all'Ueci.

(foto di Ida Bossi)

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2014

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Espero Katolika</i> (SS)	44,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*
codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Komercisto

- Johano, kion vi faras ĉi tie en Parizo?
- Mi edziĝis, mi nun estas en geedziĝa vojaĝo!
- Gratulojn! Kie estas via edzino?
- Ŝi ne estas ĉi tie. Ŝi restis en Ĝenovo.
- Kial do, en Ĝenovo?!
- Iu devas ja zorgi pri la komercejo.

Inter senlaboruloj

- Mi malamas la monon kiel malamikon. Kaj vi?
- Vi pravas. Pro la mono iuj eĉ perdis sian vivon!
- Tial mi elspezas la monon, tuj kiam mi havas ĝin.
- Tre bone! Oni devas tuj ekstermi la malamikon.
- Tamen, se de longe oni ne vidas sian malamikon...
- Kia ĉagreno!

Malfruo

Knabo ne sukcesas leviĝi frumatene el la lito. Tial, li ĉiutage atingas malfrue sian laborejon. Lia estro ne plu eltenas tion:

- Tio okazu por la lasta fojo! Se vi morgaŭ malfruos, mi maldungos vin!

La knabo decidas peti helpon de kuracisto, kiu donas al li pilolojn:

- Englutu unu el ili antaŭ endormiĝi. Vi bone dormos kaj vi vekiĝos frumatene. Efektive la postan tagon li vekiĝas frue kaj povas senhaste atingi akurate la laborejon. Sed lia estro tute koleriĝinta ekkrias:
- Sufiĉe! Foriru! Hontu! Mi maldungas vin!
- Sed... kial? Ĉu mi ne alvenis je la ĝusta horo?
- Hodiaŭ jes! Sed kie diable vi estis HIERAŬ?

En fervoja stacidomo

El laŭtparolilo:

- Oni informas la pasaĝerojn, ke la trajno el Triesto al Milano ekveturos je la horo 17:15. Oni ripetas por esperantistoj: la trajno el Triesto al Milano ekveturos kiam la malgranda montrilo indikos la numeron 5, kaj la granda la numeron 3.

Iom poste, el laŭtparolilo:

- Oni informas la pasaĝerojn pri horar-ŝanĝo: la trajno el Triesto al Milano ne plu ekveturos je la horo 17:15, nek je la 5a posttagmeze kaj kvarono, sed 15 minutojn post la 17a.

Ŝajno

- Tiu via nova laboristo ŝajnas esti tre laborema...
- Tio estas lia sola kvalito.
- Ĉu la laboremo?
- Ne, la ŝajnigado de laboremo!

Ŝoforaĉo

- Mia patro stiras tiel malbone, ke kiam li estas ĉe la stirilo, la satelita navigilo plu ne parolas: ĝi preĝas.

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2014/

